

P A C O kaj J U S T E C O.

1946

Monata revuo de la grupo B r u g g e.Sekcio de Flandra
Ligo Esperantista

.....
 : Prezidanto: Drs. F. Roose, J. & M. Sabbestraat 12, Brugge. Tel: 31981 :
 : Sekretariejo: Roose-De Kersgieter, J. & M. Sabbestraat 12, Brugge. :
 : Propagando: Maertens Gr., Nieuwstraat 54, Assebroek. :
 : Poŝtkonto: 291429, Maertens Gr., Assebroek. :

"La Imperia Kateĥismo."

Temas tie-ĉi pri la kateĥismo kiun eldonigis la imperiestro Napoleono I^a kaj kiu estis deviga por ĉiuj pastroj en la Imperio. Oni ja scias ke tiu laboreganta Franca ŝtatestro ne nur gvidis multegajn militojn (inter ili kelkaj mondfamaj kiel ekz: la batalo apud la Piramidoj, Austerlitz 1805, Jena 1806, Wagram) sed ankaŭ gvidis laboroplengan internan politikon. Li iniciatis multajn reformadojn kaj de tre proksime sekvis siajn talentulojn en la plenumo de iliaj devoj kaj reformoj. Estas konata fakto ke li tre multe zorgis pri industrio, komerco, arto. Lia civila jurokodo estas fama. Ankaŭ estas li kiu plenumis la interkonsenton kun la papo 1802. Poste li ŝanĝigis tiun konkordaton en kelkaj aferoj laŭ sia emo kaj sen antaŭaverto de la Roma pontifo. Tiaj diktatoremaj ŝtatestroj klopodas por konvinki ĉiujn ke lia reĝimo kaj lia alveno alportis la benon al la malbenita lando, la savon el la malesperiga situacio, la ordon en la malordo k.t.p. Tial historiistoj devas skribi la historion ne tiom laŭ objektiva vero, ankaŭ ne tiom laŭ propra koncepto sed jes laŭ emo de la nun reganta estro aŭ estraro. La spiritaj fortoj, kiuj ja havas tre grandan influon, devas ankaŭ servi tiun aferon. Efektive ekleziuloj oftege estas pretaj al tiu tasko se nur ili ricevas apogon kaj subtenon de la servata ŝtato aŭ reĝimo. Ni volas do doni ekzemplon, kiel la instruistoj devis instrui kateĥismon al la junaj gelemantoj. Tiu ekzemplo venas el la "Catéchisme à l'usage de toutes les églises de l'Empire Français" Paris Mame Frères 1808; p.55.

"demando: Kiuj estas la devoj de la Kristanoj je la princoj kiuj gvidas ilin, kaj kiuj estas speciale niaj devoj je Napoleono I^a, nia imperiestro ?

Respondo: La Kristanoj devas al la princoj kiuj gvidas ilin kaj ni devas speciale al Napoleono I^a nia imperiestro, la amon, la respekton, la obeon, la fidelecon, la militan servon, la impostojn ordonitajn por la protektaĵo kaj la konservado de la imperio kaj de ĝia trono; ni ankoraŭ devas al li fervorajn preĝojn por lia bonstato kaj por la prosperoj spiritaj kaj materiaj de la ŝtato.

D. Kial ni devas ĉiujn tiujn devojn je nia Imperiestro ?

R. Unue, tial ke Dio, kiu kreas imperiojn kaj ilin disdonas laŭ sia volo, superŝvetante nian Imperiestron per kvalitoj kaj en pacotempo kaj en militoj, igis lin nia suvereno, la ministro de Lia potenco, kaj Lia bildo sur tero. Honorigi kaj servi nian Imperiestron estas do honorigi kaj seŭvi Dion mem. Due, tial ke Nia Sinjoro Jezuo Kristo tiom per sia doktrino kiom per siaj ekzemploj, instruis al ni kion ni devas al nia suvereno: Li naskiĝis obeante al la ideo Cezaro-Aŭgusto; Li pagis la ordonitan imposton; kaj same kiel Li ordonis doni al Dio tion kio apartenas al Dio, Li ankaŭ ordonis doni al Cezaro tion kio apartenas al Cezaro.

D. Ĉu ne ekzistas specialaj motivoj kiuj devigas nin pli forte ankoraŭ ami Napoleonon I^{an} nian Imperiestron ?

R. Jes, ĉar li estas tiu kiun Dio starigis en la malfacilaj cirkonstancoj por ree okazigi la publikan manifeston de la sankta religio de nia prapatroj kaj por esti ĝia protektoro. Li realportis kaj konservis la publikan ordon per sia saĝeco profunda kaj laborema. Li protektas la ŝtaton per sia forta brako. Li igis la Sanktoleco de nia Sinjoro per la konsekraĵo kiun li ricevis de la suverena Pontifo, estro de la universa eklezio.

D. Kion oni pensu pri tiuj kiuj neglektus siajn devojn je nia Imperiestro ?

R. Laŭ la apostolo Sta Paŭlo, ili kontraŭgus al la ordo de Dio mem starigita kaj ili igus sin indaj je eterna kondamnado"

Oni vidas ke tiu kateĥismo estas psikologie farita. La verkinto ekspluatis ĉiun tekston en la Biblio kaj ĉiujn historiajn faktojn kiuj taŭgas por pravigi la imperiestron.

~~~~~

Kunfandiĝo U.E.A. - I.E.L. ?

Kelkaj gazetoj entuziasmege jam anoncis ĝin !

Poste aŭdiĝis alia sono. La interkonsento atingita de ambaŭ partioj devas nun esti aprokata per voĉdonado de...? de la membroj ne ! de la delegitoj ! aŭ de kiuj ?

Oni volis esti demokratia submetante tion al voĉdonado. Oni tamen ne estis sufiĉe demokratia por meti la decidon en la manoj de ĉiuj membroj. Ni nur esperas ke la instancoj kiuj decidis, ne voĉdonos kontraŭ la opinio de la tre tre granda plimulto de la membroj kiuj ja deziregas unuecon kaj kies eksponento ja devas esti la instancoj kiuj havas la rajton voĉdoni.

~~~~~

Cu Esperanto jam taŭgas por pritrakti fakajn temojn ?

Ciu kiu okupis sin pri speciala fako scias ke estas malfacile paroli aŭ skribi pri tiufakaj temoj ĉar li devas uzi multajn vortojn nekutimajn kaj nebezonatajn en la ordinara vivo. Tial, antaŭ ol oni povas science komenci al tiu afero, devas unue ekzisti fakvortaro aŭ almenaŭ studo pri la plej necesaj terminoj, do: fakterminaro.

Interesa laboro estas jam farita sur tiuj terenoj kaj tial mi sekvigas tie-ĉi liston:

- Medicina vortaro de Dro Bricqnet
 - Komerca " " Rob.Kreuz
 - Marista Terminaro de Rollet De l'Isle
 - Matematika " " Bricard
 - Aviada " " Archdeacon
 - Anatomia " " Bouchard
 - Muzika " " F.de Menil
 - Ĥemia " " Renard
 - Teknika vortaro de Verax
 - Fotografarto " Verax
 - Farmacia terminologio de Rousseau
 - Ornitologia terminaro " Stojan
 - Milita " " Bayol
 - Meĥanika " " Wüster
 - Radio " " P.Corret
 - Leĝa " " Sro Mildwurf
- Jus aperis en la dua parto de la jarlibro 1946 de I.E.L. Kiu konas ankoraŭ aliajn ? Ĉar tre versaĝne jam ekzistas pri fiziko, arĥeologio, filatelio. Jus antaŭ la milito niaj laboris je teologia kaj filozofia vortaro. Ki^u povas informi min ?

Fulmobrikoj el la Esperanto-Movado.

I. Duona jarcento post la lingvaj respondoj de Dro Zamenhof...ankoraŭ pri la akuzativo.

Ni konstatas ke je dek geesperantistoj, almenaŭ ok faras multajn erarojn kontraŭ la akuzativoregulo. Ni konstatas ke eĉ multaj revuoj entenas erarojn...kontraŭ la sama regulo. Multaj gekursanoj malkuraĝiĝas kiam ili venas al tiu gramatikopunkto. Kelkaj, pro tiu regulo, trovas nian lingvon malfacila. Multaj gelearnantoj bone lernas ĝin...sed post iom da tempo, en multaj kazoj, ne plu bone scias ĉu uzi ĝin.

En la proponitaj plibonigoj de nia lingvo, unu de la ĉefaj postuloj estis...forigo de tiu regulo. Granda skizmo okazis...parte pro ĝi. Sajnas do al mi urĝe necese plibonigi tiun staton. Kaj mi kredas ke la rimedo kuŝas en la neuzo de la akuzativo, se ne estas necese. Mi komprenas la erarantojn. Kiam mi trarigardas nombron da lernolibroj, ne mirigas min ke tiom da personoj eraras. La ĝenerala regulo estas tiel ideale facila, logika kaj simpla. "Post prepozicio ne sekvas akuzativo. Nur akuzativo en kazoj de rekta komplemento." Do "mi sidas en la ĉambro" kaj "Mi komprenas la regulon" k.t.p. Se oni povas fari la demandon "kiun?" aŭ "kion?" post la verbo, tiam sekvas akuzativo. Tuj kiam oni devas aliformigi la demandon ekz. "al kiu?" "je kio?" "de kiu?" "sur kio?" k.t.p. tiam ne postvenas akuzativo. Tamen, en kelkaj, maloftaj kazoj, pro kialo de klareco en la frazo, estas necese meti akuzativon ankaŭ post prepozicio. Ekz. "la birdo flugas en la ĉambro" por montri la direkton, la lokosangon, por diri ke ĝi estis ekster la ĉambro kaj ke ĝi nun enflugas ĝin. La frazo: "la birdo flugas en la ĉambro" signifas tiam ke ĝi estis en la ĉambro kaj tie rondflugas. Bone. Fakte malgranda afero. Ne tiom malfacila. Kaj ne tiom ofta. Sed kion mi legas en multaj libroj? "Mi metas la monon en la monujon"(!) kvazaŭ la frazo sen la dua akuzativo estus malklara! Kaj "La ŝtono falis sur lian kapon"(!) kvazaŭ ekzistus ankaŭ alia ebleco laŭ kiu ĝi povis unue kuŝi sur lia kapo antaŭ ol fali sur ĝi! Jes, mi tute bone komprenas la erarantojn. La estimataj, estimindaj kaj kimpotentaj verkantoj de multaj lernolibroj forgesas la eldiron de Dro Zamenhof en "La Esperantisto" 1890 P°27 represitan en "Lingvaj Respondoj" Paris Esperantista Centra Librejo 2^a eldono 1927 P°40: "Pri la akuzativo. Tute ĝuste la akuzativon mi povas al vi doni la jenan konsilon: uzu ĝin ĉiam nur en tiuj okazoj, kie vi vidas ke ĝi estas efektive necesa; en ĉiuj aliaj okazoj, kie vi ne scias, ĉu oni devas uzi la akuzativon aŭ la nominativon - uzu ĉiam la nominativon. La akuzativo estas enkondukita nur el neceso, ĉar sen ĝi la senco ofte estas ne klara; sed ĝia uzado en okazo de nebezono pli multe malbeligas la lingvon ol la neuzado en okazo de bezono"

Ni skribas, parolas kaj instruas laŭ tiu regulo, spite al ĉiuj lernolibroj.

II. La interna ideo..... kaj la Protestantoj.

Ke multaj Katolikoj, en sia fanatikeco aŭ en sia malkapablo bone juĝi, miskomprenas kaj kondamnas la internan ideon; tion ni jam de longe scias. Sed ke Protestantoj kiuj pretendas esti "larĝpensaj" kaj kiuj efektive estas ofte iom tro "larĝpensaj" ankaŭ timas la internan ideon; tion ni ne scias kaj tio mirigas nin. Kaj tamen ni legas en "Nederlanda Esperantisto" 25 Sept. 1946 p.5 ke laŭ Drs Hofman el Leeuwarden, reprezentanto de N.L.E.V., la interna ideo estas la kaŭzo kial tiom da Protestantoj staras malakceptemaj je Esperanto. La saman ni legas "Laborista Esperantisto" 1 Oktobro 1946 en la raporto pri la propaganda kunveno okazinta en Utreĥt. Do ankaŭ la Protestantoj ne ankoraŭ scias ke la interna ideo estas nur morala kondutregulo kaj tute ne ia nova religio! Kiom da fojoj kaj en kiom da artikoloj oni ankoraŭ devos montri tion antaŭ ol kelkaj fine komprenos? Jes Dro Zamenhof volis ankaŭ unu religion por unuigi la homaron. Li kreis kaj nomis ĝin la "Homarismo". Sed de post la momento ke li propagandis ĝin li eltiris sin kiel oficialulon el nia movado. Li iĝis esperantisto inter la esperantistoj ĉar li volis neniel ligi la E°movadon al tiu nova religio. Tamen ekzistis kaj restis la interna ideo. La interna ideo kiu predikis ke ĉiuj uzantoj de Esperanto devas ami unu la alian, konduki kiel gefratoj, havi la emon helpi reciproke, ekkoni kaj ekkompreni unu la alian. Estas tial ke Mons. Prof. Dr. Fr. Erdey diris foje ke ĝi estas tute en harmonio kun la instruado de J. Kristo. Do? mi demandas al mi kiajn "Bibliajn" argumentojn la Protestantoj nun ankoraŭ kapablas alporti kontraŭ nia idealo.

=====

2) Ĉu vi ŝatus ricevi belan Esperantan libron ?

Bonvolu do certe partopreni nian konkurson !

Via tasko: skribu al nia radiostacio:

- 1) Kion vi opinias pri Ĉeĥoslovakujo ?
- 2) Kio vin interesas el nova vivo en Ĉeĥoslovaka respubliko ?

Interesajn lterojn ni publikigos en Ĉeĥa gazetaro. Ĉiu samideano, kies letero estos publikigita ricevos ekzempleron de la gazeto kun sia artikolo kaj Esperantan libron. Sed ni petas, skribu tute sincere ! La respondoj ne devas esti longaj. Sufiĉas kelke da koncizaj, sinceraj frazoj. Ni ne dubas, ke vi afable diros pri tiu ĉi nia konkurso al viaj amikoj, eĉ al neesperantistoj, ke ni ricevu multe da respondoj kaj pruvu tiamaniere praktikan uzeblecon de Esperanto !!

Ni jam antaŭe al vi dankas kaj esperas baldaŭ ricevi vian ŝatatan leteron aŭ poŝtkarton.

Sciigojn pri aŭdebleco de nia radiostacio kaj respondojn je nia konkurso bonvolu sendi al la adreso:

R a d i o s t a c i o

O s t r a v a, Ĉeĥoslovakujo.

WWWWWWW WWW WWW WWWWWW WWWWWW WWWWWW WWWWWW WWWWWW WWWWWW WWWWWW WWWWWW WWWWWW WWWWWW

????? Angulo de la serĉenuloj - ??????

- 1. De la du enigmoj kiuj aperis en la Oktobra N° ni ricevis bonajn solvojn de R. De Schepper, A. Spruytte kaj R. Iserentant.
- 2. Tuj post la sendo de la lasta komuniko al la redakcio ni ricevis bonan solvon de R. Iserentant kaj Gilbert Bruyneel. Sekvis ankoraŭ M.Th.Roose kaj Gr.Maertens.
- 3. Grandan dankon ni ŝuldas al samideano A.Spruytte kiu ensendis kvar interesajn enigmojn. Por tiuj li do gajnas 20 p. Sed ni demandas al li ke li ankaŭ bonvolu sendi la solvon al ni. Ni havas nur de unu la solvon nome de la krucvortenigmo kiun ni nun publikigas. La alia publikigita enigmo estas ankaŭ de li.
- 4. Jen la hodiaŭa klasifikado (1-XI-46)

1. A.Spruytte	55 p.	5. R.De Schepper	17 p.
2. M.Th.Roose	26 p.	6. R.Iserentant	15 p.
3. Gr.Maertens	20 p.	7. Et.De Baets	14 p.
4. G.Mallet	18 p.	8. M.L.Senave	5 p.
- 5. Solvojn de Novembra N° ni akceptas ĝis 30^a Nov. !

Krucvortenigmo.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15
1				X									X		
2		X					X		X						X
3						X				X					
4				X							X				
5			X									X			
6		X			X		X		X				X		
7	X				X		X		X						X
8		X			X		X		X				X		
9			X									X			
10	X			X			X				X			X	a
11						X		X							

Horizontale:

- 1- loĝas en palaco.R. Eŭropa landnomo. Loĝas en Italujo.R.
- 2- figuraĵo de sanktulo(rusa eklezio).R. Versajna.
- 3- ŝanĝiĝema. Adverbo. Blanka floro.
- 4- ovoforma.R. Metala ornamenta kapvesto. Sen ĝi, mi ne povas aĉeti panon.R.
- 5- fluas el vulkanon.R. Nomo de la belga reĝo. frotbriligi.R.
- 6- prabovo.R. artikolo. Sufikso. Prepozicio.
- 7- granda akvo.R. Granda akvo.R.
- 8- korelativo. Kreinto.R. Sufikso. Sufikso.
- 9- vivanta estaĵo. Prijuĝo. Prepozicio.
- 10- nova testamento(mallongigo). Korelativo. Konjunkcio. Sufikso.
- 11- kompasdirekto.R. Tramultvorta preĝo.R.

Vertikale:

- 1- instiganto.
- 2- eco de judoj.R. Konjunkcio.
- 3- sovaĝa besto.R. Pers.pron.
- 4- pezilo.R. Maldika plato.R. Tio estas(mallongigo).
- 5- serpento.R. Verdrestanta arbo.R.
- 6- prepozicio. Konjunkcio. Kompleta aro de ekleziaj ceremonioj.R.
- 7- solena, publika religia ceremonio.
- 8- rapida kuro de ĉevalo.R.
- 9- formo de la verbo:inokuli.
- 10- prepozicio. Konjunkcio. Malsupra parto de la domo.R.
- 11- sufikso. Nomo de floro.
- 12- linio inter du landoj.R. Loĝas en Danujo.R. Sufikso.
- 13- domo de la reĝo.R. Prepozicio.
- 14- nomo de floro.R. Sufikso.
- 15- longtempe prokrasti.

Germana aritmetika problemo.

Gardisto en malliberejo vidis germanan militkaptiton kiu levprenis malgrandajn cigaredstumpojn.
 La gardisto demandis al li: "Kiom da cigaredstumpoj vi trovis?"
 La kaptito respondis: "Mi bezonas sep stumpojn por ĝfari unu cigaredon. Nun, mi havas tiom da stumpoj, ke mi povos fumi ok cigaredojn kaj restos al mi unu stumpo."
 Kiom da stumpoj posedis la kaptito ?

aa

HET TAALPROBLEEM IN DE NAORLOGSCHE ORGANISATIE.

- door Dr Wilhelm Solzbacher
 uit "American Esperantist" May-June 1945.
 - vertaald door medelid Jozef Hautekiet.

++++

Wanneer het gerucht de ronde deed dat de Fransche taal niet een van de officieele talen der Conferentie van San Francisco kon zijn - Engelsch, Russisch en Spaansch waren de eenige talen daartoe erkend - was er een groote opwinding in Frankrijk en onder de Fransche Canadeezen.

Dit voorrecht werd aan de Russische taal beloofd te Yolta, en aan het Spaansch te Chapultepee, zoo werd er gezegd, terwijl de aanspraak der Fransche taal slechts zou betwist worden op de Conferentie zelf. De liberale vertegenwoordiger L.P.Picard van Bellechasse vroeg den In Minister Tackenzie King in het Canadeesch Lagerhuis: "Weet de regeering welke talen er officieel zullen zijn op de Conferentie van San Francisco en, in geval dat het Fransch niet moest erkend zijn als een dezer, zal dan de Staatssecretaris voor Buitenlandsche Zaken aanmerkingen maken op het feit dat het Fransch moet bevat worden onder de officieele talen?" Het antwoord van den In Minister was niet bevestigend: "Ik geloof dat het niet wijs zou zijn een uitspraak te doen op deze zaak alvorens de Conferentie zelf een gelegenheid heeft gehad het te betwisten." Dat voldeed de Fransche Canadeezen niet.

